

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Pentekosto, de Bojce Molodoj. — La Mesoj por la Paco. — Juventus Catholica, de W. S. — Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado. — Al memoro je Kardinalo D-ro Friedrich Gustav Piffl de Wien, de Walter Mudrak. — Kiel legi? de Herbert N. Casson. — Internacia Katolika Junulara Agado. — El la Katolika Paca Movado. — El la Esperanto-Movado. — Esperanto en la Kolping-Internacio. — Grava; Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1932. — Nia Movado. — Novaj Esperanto Libroj. — Anoncetoj. — Katolika Vivo.

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).

Abonprezoj de "La Juna Batalanto",

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s 4 p	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2,4 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Cehoslov.	18 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	3 p	4,50 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtена kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

VERKOJ DE D-RO ZAMENHOF,

aŭtoro de Esperanto :

Fundamento de Esperanto , kvinlingva : franca-angla-germana-rusa-pola, 196 paĝoj.	RM 1.20
Fundamenta Krestomatio , El literaturo, poezio, scienco de ĉiuj landoj, 472 paĝoj.	RM 3.—
Lingvaj Respondoj , 96 paĝoj.	RM 1.20
Proverbaro Esperanta , 82 paĝoj.	RM 1.50
Fabeloj de Andersen , 3 volumoj., 152 + 152 + 160 paĝoj, po volumo 1.40, 3 volumoj	RM 4.20
Ifigenio, de Goethe , 170 paĝoj.	RM 1.50
Hamleto, de Shakespeare , 170 paĝoj.	RM 1.20
La Revizoro, de Gogol , 100 paĝoj.	RM 1.50

Ankaŭ ĉiuj aliaj verkoj de Zamenhof estas haveblaj ĉe ni. Aldonu 10% por sendkostoj!

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück.

Pentekosto.

Pentekosto estas nia festo.

Pentekosto estas la festo de la blovanta spirito, kiu vivigas kaj plenigas per apostola fervoro. Gajni la mondon por Kristo, realigi Lian Regnon kaj Lian Pacon, estas nia celo. La pentekosta spirito blovadu tra niaj animoj kaj forpelu ĉiun timemon kaj lacecon. Kio estas la plej granda bono de nia juneco? Ke ni ankoraŭ estas malfermitaj al la spirito, ke ni ankoraŭ havas kuraĝon kaj pretecon moviĝi kaj movi la « realan » mondon!

Pentekosto estas la festo de la fajro. Sankta Fajro venis en la mondon, por bruli, por forbruli ĉion, kio estas malpura, malforta, malĝoja. Niaj animoj brulu por ĉiam per tiu fajro, por ke iam la tuta mondo ekbrulu en la fajro de la amo!

Pentekosto estas la festo de la lingva unueco. Homoj el ĉiuj naĉioj kaj landoj komprenis unu la alian per la pentekosta miraklo. Kaj tra la tuta homa historio la sopiro al tiu granda unueco vivis en la homoj. Ni havas komunan lingvon malgraŭ ĉiuj naciaj kaj rasaj diferencoj, ni havas malfortan rebrilon de la pentekosta miraklo. Ni laboru, por ke la unuiga lingvo Esperanto ĉiam pli enpenetru en la rondojn de niaj fratoj kaj fratinoj, en la tutan vastan katolikan junularon! Sed ni ankaŭ agadu, por ke nia unueco estu pli ol lingva komprenado, ke ĝi fariĝu unueco de la sento kaj de la volo!

Ni malfermu niajn korojn al la Sankta Spirito! Ni fariĝu liaj humilaj instrumentoj por la renovigo de la vizaĝo de la tero! La pentekosta fajro estas nia venko! Ni ne lasu estingiĝi ĝin!

Pentekosto estas nia festo.

BOJEC MOLODOJ.

LA MESOJ POR LA PACO.

Jam kelkfoje ni skribis pri la porpacaj mesoj. Jen interesa raporto legita en la Internacia Komitato de la Mesoj por la Paco. Ni represas ĝin el la gazeto de la franca katolika junularo « Les Annales de la Jeunesse Catholique ».

Depost kelkaj jaroj enketo ĉe bonaj katolikoj komuniantaj ĉiutage konvinkis nin, ke tre maloftaj estas tiuj, kiuj preĝas por la paco, kvankam ĉiuj arde deziras ĝin. La paco estas nun universala problemo. La individuo sentas sin tiel malforta rilate al ĝi, ke ĝi facile forgesas la valoron de la spiritaj fortoj, kiujn Jesuo Kristo lasis en niaj manoj. Kiam la kredo de la homo dubas je la forto de Dio, la mondo fartas malbone.

La movado de la Mesoj por la Paco estiĝis el tiu enketo kaj tiu konvinko.

Tiuj, kiuj komencis ĝin, ekster ĉiu partipolitiko, starigis ĝin sur bazon pure religian. Ili konas bone la grandajn malhelpojn kaj la malfacilaĵojn en la realigo de la paco. Ili estas konvinkitaj, ke ĝi estas Dia kaj ne homa laboro,

kvankam ĝi postulas klopodon de ĉiuj animoj de bona volo. La problemo de la paco estas abismo, kiu unue devas esti plenigata per la *spirito* de la paco...

En Paris, en februaro 1931, en nebula vendreda mateno (13 februaro) Pastro Desbuquois, direktoro de la Popola Agado (Action Populaire), kaj Pastro D-ro Brauns, kiu estis dum 8 jaroj laborministro de Germanujo, celebris samtempe en la preĝejo de Nia Sinjorino de la Venkoj (Notre-Dame des Victoires), niajn unuajn mesojn por la paco; nur kvar personoj ĉeestis.

Denove Pastro Desbuquois celebris la meson en marto; la ĉeestantaro estis pli granda, kvar nacioj estis reprezentitaj. Dank' al la neforgesebla akcepto de Pastro Jourdain de la preĝejo de Nia Sinjorino de la Venkoj, la Internacia Sekretariejo de la Popolaj Mesoj estis fondita kaj funkciis regule en tiu honorinda loko, kie la murej mem proklamas la potencon de Mario. Je ŝiaj piedoj depost jarcento ĉiaj petoj de la homa animo estis aŭditaj kaj elauditaj, kaj ĝi kredas kun la neŝancebla konfido de infanoj, ke la Sanktega Virgulino havis ian delikatan patrinan malpaciencon, vidante nin veni, por petegi de ŝi la repaciĝon inter la homoj, la plej grandan el ŝiaj venkoj post tiu alia, kies perantino ŝi estis kaj kiu repaciĝis la Teron kun la Ĉielo...

Samtempe ni trovis en la ĵurnalo « La Croix » (la kruco) kuraĝigan kaj valoran helpon. Ĝiaj kolonoj ĉiam estis larĝe malfermitaj al ni.

Tuj multaj personoj el la intelekta elite de la franca katolikaro donis siajn nomojn al la Honora Komitato, kaj Lia Kardinala Moŝto Verdier (de Paris) bonvolis doni sian altan kaj patran patronecon. La filoj de Sankta Dominiko certigis al ni subtenon neniam elĉerpeblan.

En junio 1931 Portugalujo aliĝis kun monata meso.

En julio la germana kanceliero Brüning, veninta al Paris por du tagoj, akceptis nian inviton, kaj per lia partopreno la mesoj fariĝis tutmonde konataj. La emociiga prediko farita antaŭ li kaj la franca ministro Champetier de Ribes de Pastro Dassonville estis radio-disaŭditaj tra la mondo.

En aŭgusto, je la peto de la pia Princo Hatzfeld, Kardinalo Bertram, prinĉepiskopo de Breslau, proponis al la germanaj episkopoj kunvenintaj en Fulda monatan Meson por la Paco en ĉiuj eparkioj. La propono estis akceptata. Msgr. Schreiber, episkopo de Berlin, celebras mem ĉiumonate la meson de la germana ĉefurbo.

En aŭgusto ankaŭ la Karmelo de Lisieux aliĝis kun monata meso.

Samtempe ĉiuj francaj kardinaloj aldonis sian patronecon al tiu de Kardinalo Verdier.

En septembro oni malfermis Oran Libron destinitan por Lia Papa Moŝto, kun la nemoj de la nacioj, eparkioj kaj pastroj aliĝintaj.

La 7 oktobro la Vatikana ĵurnalo Osservatore Romano esprimis la deziron, ke ĉiuj eparkioj de la mondo havu monate siajn Mesojn por la Paco.

MALLONGA, SED GRAVEGA SCIIGO.

Ĉi tiu numero estas la unua de la 7-a jarkolekto. Do estas tempo por pagi la abonon. Geemakoj, kiuj tian faras tuj, ne atendante admonilon, konsiderinde plifaciligas nian laboron kaj ŝparas al ni zorgojn, laboron, tempon kaj monon. Bonvolu pripensi, ke en kriza tempo duobla disciplino estas necesa por ideala movado. Ni faros nian devon. Vi, kara abonanto, faru vian! Ankoraŭ hodiaŭ sendu vian abonprezon! Kaj demandu vian amikon, ĉu li ne volas ankaŭ aboni! Dankon!

En novembro Hispanujo aliĝis: la episkopo de Barcelono, Msgr. Irurita, publikigis artikolon en la religia gazetararo, invitante la pastrojn kaj la fidelulojn, aliĝi al la movado kaj propagandi ĝin, anoncante, ke li mem celebros regule en sia katedralo Meson por la Paco.

En decembro venis Belgujo kun tri monataj mesoj en Bruxelles, Liège kaj Louvain.

En la antaŭtago de Kristnasko Kardinalo Verdier bonvolis mem proponi al ni, celebri en la printempo nian meson en la preĝejo de Nia Sinjorino de la Venkoj.

La 31 decembro ni ricevis leteron de Msgr. Gerlier, episkopo de Lourdes: Mi estas feliĉa informi vin, ke en la nova jaro ĉiun unuan sabaton en la monato estos celebrata Meso por la Paco en la Groto de Lourdes. Estos al mi granda ĝojo, mem celebri ĝin, kiam ni ne havos pilgrimantojn. Sed en la pilgrimperiodoj mi petos alterne unu el la ĉeestantaj episkopoj francaj aŭ eksterlandaj, celebri la Meson por la Paco, kiun ni mem ankaŭ partoprenos kaj al kiu mi invitos la reprezentantojn de ĉiuj pilgrimoj.

Fine en la jaro 1932 Rusujo eniris la Sekretariejon, pokante al ni la miraklan forton de simileco kun Kristo, kiu troviĝas en la preĝejo de la martiroj. La kunlaboro de Msgr. Evreinoff pli profunde enpenetrigas nin en la universalecon de la Eklezio, per monata meso en slava rito...

JUVENTUS CATHOLICA

« Juventus Catholica », « Katolika Junularo » — tia estis la nomo de la granda Katolika Junulara Internacio, kiun devis prepari la Sekretariejo de la Internaciaj Katolikaj Junularaj Kongresoj kreita en Romo 1921. Tiu granda internacio ankoraŭ ne realiĝis, kaj eĉ la modesta sekretariejo en Romo estis devigata fermi siajn pordojn pro malfacilaj eksteraj cirkonstancoj. Kaj tamen — la ideo de la internacia solidareco de la katolika junularo ne estas mortinta! En miloj da koroj ĝi vivas, kaj se ankoraŭ ne oficialaj ligiloj kunigas la diverslandajn asociojn, almenaŭ persona amikeco kaj intereso konstruas pontojn de lando al lando. Konstrui tiajn pontojn de amikeco kaj solidareco, tio ja estas ankaŭ la celo de nia Mondjunularo Katolika kaj la celo de nia gazeto La Juna Batalanto...

Kiel ni povas ami unu la alian kaj helpi unu la alian, se ni ne konas la katolikan junularon de aliaj landoj? Pri la grandaj asocioj tia nekonado estonte ne plu povos ekzisti, ĉar ĵus aperis grava libro kun la ĉeftitolo JUVENTUS CATHOLICA kaj kun la subtitolo « la katolikaj junularaj asocioj de Eŭropo ». Ĝi estas germanlingva, ampleksas 212 paĝojn, aperis en la eldonejo REX (Verlag S. K. J. V.) en Zug (Svisujo) kaj kostas 3 sv. fr. (2,40 RM).

20 gvidantoj de la katolika junularo el 17 landoj kunlaboris por krei tiun impenan kaj intereseigan verken. Pastro Suter, bone konata al kelkaj el niaj legantoj, ĉar li ja estis unu el la prezidantoj de la II-a MOKA-kongreso (Luxembourg 1922), estas la eldonanto, kaj la juna asocia sekretario Eugen Vogt, kiu nun ja ankaŭ estas la landa reprezentanto de MOKA, zorge varbis kompetentajn kunlaborantojn kaj kunmetis la gravan dokumentaron. La ekstera aspekto estas inda kaj impona, — kaj la enhavo ankaŭ.

Mmgr. Josephus Ambühl, episkopo de Basel kaj Lugano, diras en sia antaŭparolo : « El la multnombraj raportoj parolas sana, esperoĝoja optimismo : volo al agado, nerompebla kuraĝo kaj ĝoja espero, tiel ke la legado de la libro vidigas printempan blovadon, kiu kreskigas la burĝonojn, vekas la florojn kaj sorĉe aperigas majan ĉarmon ». La artikoloj estas diversspecaj. Kelkaj estas sekaj statistikoj, aliaj montras la viglajn tendencojn de la juna generacio. Kelkaj artikoloj, ekz. tiuj pri Belgujo, Francujo, Germanujo, Aŭstrujo, Svisujo, raportas pri forte organizitaj movadoj, aliaj, ekz. pri Danujo, Jugoslavujo, Latvujo, Portugalujo, montras heroan batalon en izolece, aliaj montras belan komencon de la agado.

La sola *internacia* asocio, pri kiu la verko raportas, estas nia MOKA, pri kiu detale informas 12 paĝa artikolo de ĝia ĉefsekretario. Ankaŭ kelkaj aliaj kunlaborintoj estas varbitaj pere de MOKA. La libro devus troviĝi en la mano de ĉiu, kiu serioze interesiĝas pri internacia katolika kunlaboro. Ni deziras al la libro, ke la unua eldono baldaŭ elĉerpiĝu, por ke la dua estu ankoraŭ pli kompleta kaj perfekta.

Ĉu estas vere hazardo, ke nun samtempe aperas tia libro germanlingva kaj internacia enketo franclingva pri la sama temo en la grava revuo « Documents de la Vie Intellectuelle »? Ĉu tio ne estas pruvo, ke la bezono de tiaj informoj kaj de internacia katolika kunagado en la junularo estas granda kaj urĝa? Ĉu nun ne estus ankaŭ tempo, por prepari definitive tiun grandan « Manlibron de la Internacia Katolika Junulara Agado » (en Esperanto), kiun MOKA jam projektis antaŭ kelkaj jaroj? Helpu nian movadon, por ke ĝi fariĝu sufiĉe forta, por riski tian entreprenon!

Al tiuj, kiuj komprenas germanan lingvon, ni adresas urĝan peton : Mendu la verkon **JUVENTUS CATHOLICA!**

W. S.

KRUCMILITO DE EŬROPA JUNULARO POR MALARMADO.

En aprilo la agado finiĝis post pli ol dumonata sukcesa laboro. 50.000 homoj, precipe junaj homoj, partoprenis la kunvenejn kaj manifestis por sia energia paca volo.

Tra Francujo, Nederlando, Belgujo, Germanujo kaj Svisujo iris la junaj pilgrimantoj de la paco, ĉiam diversnaciaj parolantoj vojaĝis kune, kaj en preskaŭ ĉiuj 150 kunvenoj unu franco, unu germano kaj unu anglo paroladis. En multaj lokoj, speciale en vilaĝoj, la akcepto de la loĝantaro estis entuziasma. Okazis emociigaj scenoj de franca-germana fratiĝo. En kelkaj lokoj ankaŭ okazis specialaj diservoj por la paco samtempe en katolika kaj protestanta preĝejo.

En unu fanca vilaĝo la komunuma konsilantaro decidis, planti arbon sur la ĉefplaco, por memori la krucmiliton, en kelkaj germanaj lokoj francoj estas invitatitaj en familiojn, por restadi pli longe. En kelkaj lokoj oni nun preparas specialajn libertempohojojn post internacia amikeco.

En kelkaj regionoj grupoj de gejunuloj marŝis piede tra la lando kun la standardo portanta la surskribon « Treuga Dei 1932 » (Dia Paco 1932). Tiuj gejunuloj estis el diversaj landoj (Anglujo, Francujo, Belgujo, Germanujo kaj

Usono estis reprezentitaj), la pilgrimoj plej bone sukcesis en Rejnlando kaj en Suda Francujo, kaj la anglaj partoprenintoj estas tiel entuziasmitaj, ke ili nun volas fari ion similan en sia lando.

Dimanĉon, la 3 aprilo, okazis la granda fina kunveno en Genève kun parolantoj el ses landoj kaj reprezentantoj de diversaj tendencoj de la junularo. Kiel aŭstra delegito kaj reprezentanto de MOKA paroladis la aŭstra MOKA-sekretario Walter Mudrak, kaj li ankaŭ atentigis pri Esperanto kaj diris unu frazon en la helplingvo.

London, la 4 aprilo, delegitaro 12 persona iris al S-ro Henderson, prezidanto de la Granda Malarma Konferenco de Genève. Inter la delegitoj estis tri MOKA-anoj : Kaspar Mayr, Walter Mudrak kaj Wilhelm Solzbacher, Philippe Vernier (Paris), Helen Kirkpatrick (New York), Wilhelm Solzbacher (Köln) kaj Robert D. Hogg (London) diris al Henderson, kion la junularo pensas kaj volas kaj transdonis al li peticion. En ĝiaj unuaj partoj ĝi estis la sama kiel la manifesto, kiun La Juna Banalanto publikigis en sia januara numero. En la fino ĝi diras : « La nuna konferenco decidis pri vivo kaj morto de la juna generacio; des pli ni bedaŭras, ke la junularo havas nenian influon al ĝi. Ni subtenas ĉiun seriozan mezuron, kiu realigas gravan malpliigon de la armadoj. Se tamen la Konferenco ne havos kontentigan sukceson, ni estas decidintaj, preni la malarmadon en niajn proprajn manojn. Ni rifuzos preni la armilojn unu kontraŭ la alia kaj partopreni novan militon, kies viktimo estos la junularo. »

S-ro Henderson respondis en pli longa parolado, esprimante sian ĝojon pri la granda aktiveco de la junularo. Kvankam li ne konsentas kun ĉiuj vortoj de la delegitoj, ankaŭ lia celo estas la kompleta malarmado. Li diris, ke li ne povas kredi je malsukceso de la Konferenco, ĉar estus nekredible, ke reprezentantoj de 62 registaroj tiugrade ignorus sian devon kaj la postulon de la publika opinio.

En multajn rondojn de la junularo la Krucmilito enportis novan entuziasmon kaj aktivecon. Ĝi do bone atingis sian celon.

Al Memoro je Kardinalo D-ro Friedrich Gustav Piffl de Wien.

La 21 aprilo 1932 grava perdo trafis la katolikojn de Vieno kaj tuta Aŭstrujo. Ilia kara eklezia gvidanto kaj ĉefpastro D-ro Piffl, ĉefepiskopo de Wien deposed 1913, kardinalo deposed 1915, estis forvokita el tiu ĉi mondo en la 68a jaro de sia agadplena, ĉiam laborriĉega vivo. Profunde funebras pri lia morto tute speciale la katolika Esperantistaro, kiu nun perdis grandan amikon, altan protektanton. Liaj fortikonvinkaj vortoj « *Esperanto estas taŭga ilo por defendi la katolikan kredon* » ofte efike helpis en la batalado por Esperanto kontraŭ bedaŭrindaj antaŭjuĝemoj kaj nekomprenemo en katolikaj rondoj. Li ĉe ĉiuj okazoj montris sian grandan intereson, emon kaj favoron por Esperanto kaj la katolika Esperanto-movado. Li tion speciale publike montris okaze de la IXa Internacia Katolika Esperanto-Kongreso en la jaro 1924 en Wien, kies solenan malferman kunvenon li *persone* ĉeestis (certe neoftaĝo ĉe katolikaj Esperanto-kongresoj)

kaj alte honoris per parolado, kiu estis esprimo de sincera konfeso por Esperanto kaj ĝia apliko inter la katolikaro. Jen la traduko de la laŭvorta germanlingva parolado :

« Tre estimataj kongresanoj!

Tre estimataj gesinjoroj!

Akceptu mian koran dankon pro viaj afablaj vortoj de salutado. Ne estas necese, ke mi certigu vin, ke mi volonte estas veninta al la unua kunsido de via kongreso, ĉar mi scias rekoni kaj ŝati alte la valoron de la mondlingvo Esperano. Mi faris tion precipe, konsiderante niajn cirkonstancojn nunajn. Ni vivas en tempo, kiu havas la taskon transpontigi, kunligi, krei atmosferon de konfido inter la popoloj. De la konfido al la amo estas nur unu paŝo, kaj tiun-ĉi aferon de amo efektiviĝi estas antaŭ ĉio la devo de la katolikoj de la tuta terĝlobo, de tiuj katolikoj, kiuj jam pro tio estas destinitaj por la granda tasko de paco, ĉar unu kredo, unu ofero kaj unu ĉefestiro ilin kunligas plej intime. En neniu alia kredo la ĝermo de la unueco tiel elbrilas el la kronjuvelaro de Kristo, kiel en la katolika Eklezio. Al ĉi-tiu unueco venu ankoraŭ la rubando de unuiga interrilata lingvo. Ĉar ĉiu respektas kaj honoras sian gepatran lingvon. Sed ni bezonas en la nuna tempo interrilatan, interligan lingvon, kaj tia estas Esperanto.

Tre estimataj kongresanoj! Mi venis antaŭ ne longe de la Eŭkaristia Kongreso en Amsterdam. Tie oni uzis grandan, novan, modernan interkomprenigilon, la t. n. laŭparolilon, kiu ebligis, ke paroladoj tute mallaŭtaj estis komprenataj ĉzakte kaj klare en la tuta Stadio, kaj la apliko de la « Radio » eĉ ebligis, ke la rosarion, preĝatan dum la procesio en la Stadio oni kunpreĝis eĉ en malproksimaj partoj de la lando. Kial mi tion mencias? Ĉar mi ĉiam pensis, ke per aturaj rimedoj nun la efiko de la pentekosta miraklo povus realiĝi, se dum ĉiuj niaj internaciaj kongresoj oni nur uzus Esperanton. Nun la grandega Amsterdama kongreso montris sian internaciecon per la diverseco de la lingvoj. Per Esperanto tamen la paroladoj ne nur estus ĉie aŭditaj, sed ankaŭ komprenitaj.

En tiu sento mi salutas vian kongreson, deziras al ĝi veran sukceson, kaj donos al vi mian benon. »

Kaj ĉiam denove li akcelis la al li valoran aferon. Li i. a. konsentis eniron en la honoran komitaton de la *Internacia Esperanto-Muzeo*, kiun li ankaŭ pasintjare ankoraŭ persone vizitis kaj tre atenteme rigardis; ja ankoraŭ 2 semajnoj antaŭ lia morto li estis akceptinta pastron Ĉe kaj prezentinta sian viglan interreson.

Estas efektiva devo por ni katolikaj Esperantistoj, memori la karan mortinton preĝe kaj pense, sed ankaŭ speciale per ĉiam fervora agado por nia afero, ne forgesante sed utiligante liajn varmajn, ĉiam vivantajn vortojn kaj farojn por Esperanto kaj ties servigo al la idealoj de nia sankta religio, kiuj nuntempe pli ol iam ajn devas instigi nin, labori por krei atmosferon de amo kaj paco en la mondo laŭ la vera regno de Dio.

Walter MUDRAK, Wien.

Kiel Legi?

Pitt aĉetis libron : « La Bonfarto de la Nacioj », de Adam Smith. Li kreis por la brita nacio pli saĝan politikon.

Cecil Rhodes aĉetis libron : « La falo de la romana imperio », de Gibbons. Li iris poste al Afriko kaj pligrandigis la britan Imperion.

Westinghouse aĉetis anglan revuon kaj trovis en ĝi artikolon pri kunpremita aĉero. Tio donis al li lian ideon pri la premaera haltigilo.

Faraday aĉetis libron pri la kemio. Li fariĝis fondanto de la elektra epoko.

Henry Ford ankaŭ aĉetis revuon kaj vidis artikolon pri « veturiloj sen ĉevaloj », per tio li venis al la vojo, kiu kondukis al lia sukceso.

Inter la famaj homoj ekzistas centoj, kiuj ŝuldas sian sukceson al la legado. La legado devus havi celon. Ni devas pensi dum legado. Ni devas kapti bonan ideon kaj diri : Ĝi povas esti al mi utila!

La legado — se homo lernas bone legi kaj sekvigi agadon al la legado — malfermas al li la pordon kondukantan al pli altaj sferoj. La legado estas ŝtupetaro...

Herbert N. CASSON (J. O. C.).

Internacia Katolika Junulara Agado.

PAX ROMANA, Internacia Ligo de Katolikaj Studentaj Asocioj, kune kun la aliaj 6 internaciaj studentaj organizaĵoj havas specialan komitaton kaj sekretariejon por la Malamada Konferenco. Tiu komitato estis reprezentita en la Pariza Malarmada Kongreso, kaj unu el ĝi povis ankaŭ paroladi en Genève. Rudi Salat, sekretario de Pax Romana, ĉeestis la Parizan kongreson. — Komence de marto 1932 okazis en Lille (Francujo) Internacia Katolika Gazetara Kongreso, organizita de la tieaj universitataj studentoj. Pax Romana kunhelpis en tio. —

La nunjara kongreso de P. R. estos en Bordeaux kaj Lourdes, 8-11 aŭgusto la laborkunsidoj estis en Bordeaux, kaj poste oni faros pilgrimon al Lourdes (11-14 aŭgusto). Nunjara prezidanto de PAX ROMANA estas D-ro G. Godard (Alger), vicprezidantoj estas Roger Pochon (Svisujo) kaj D-ro Lambert Schauss (Luksemburgo).

Internacia Gazetara Kongreso de la Katolika Universitata Junularo okazis 4-6 marto en Lille (Francujo), Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Ĥinujo, Irlando, Jugoslavujo, Kanado, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Svisujo estis reprezentitaj. Multaj altranguloj partoprenis, kaj en la ferma kunveno paroladis Kardinalo Liénart de Lille post multlingva salutado de la eksterlandanoj. — En tiu kongreso estas kreita Internacia Sekretariejo de la Katolika Universitata Gazetaro (Secrétariat International de Presse Universitaire Catholique, S. I. P. U. C.), kies adreso estas : 127, rue Meurcin, Lille, kaj kiu funkcias kiel faka sekretariejo de PAX ROMANA. Ĝi eldonos kune kun la Internacia Oficejo de la Katolikaj Journalistoj manlibron de la katolika universitata gazetaro. Oni konstatis, ke la nombro de la katolikaj universitatanaj gazetoj kaj ĵurnaloj estas ĉ. 300! Oni preparas pli kompletan interŝanĝoservon LA JUNA BATALANTO partoprenis en ĝi.

Internacia konferenco de katolikaj studentoj okazis en la paska semajno en Luxembourg. La luksemburga asocio invitis, kaj gvidantoj el Belgujo (flandra kaj valona), Francujo, Germanujo (asocioj K V, U V, H V), Luksemburgo, Nederlando, Svisujo partoprenis. La temo estis : « La katolika studento kaj la problemoj de naciismo kaj internaciismo ». D-ro Lambert Schaus (Luksemburgo) prezidis, kaj kvar luksemburganoj faris la ĉefparoladojn, traktante la temon laŭ la religia-morala, kultura, ŝtatana kaj studenta vidpunkto. La diskutado estis vigla. La sekretario de PAX ROMANA, Rudi Salat, ĉeestis. Okazis festeno organizita de la luksemburga Katolika Studenta Asocio, la franca kaj germana ambasaderoj partoprenis ĝin.

Internacia Katolika Studenta Kongreso okazis en Bruxelles (Belgujo) 9-11 aprilo. La belga katolika studenta asocio organizis ĝin pri la temo « La Paco », la princo Frédéric de Mérode prezidis. Generale la publiko estis belga, sed oni sukcesis gajni eksterlandajn delegitojn el 20 landoj. Kiam oni parolis pri politikaj problemoj, okazis sufiĉe granda disputo kaj konfuze, kaj fine oni preferis

pritrakti la katolikajn *principojn*, kiuj estas tre klaraj, kaj alvokis al paca sento. Oni permesu al ni, represi kelkajn frazojn el la kritiko, kiun nia amiko Marcel Laloire publikigis en « L'Esprit Nouveau » : « Tro multaj delegitoj faris la impreson, ke ili estus kvazaŭ delegitoj de sia registaro. Ni estis tie kiel junuloj, kiel katolikoj kaj kiel studentoj, por diskuti niajn devojn rilate al la paco kaj al la institucioj, kiuj devas starigi kaj certigi ĝin. Ni estas *neniel* solidaraj kun la politiko de niaj registaroj. Ni havas la rajton kaj prenas al ni la rajton, kritiki kaj, se necese, kondamni ĝin. Ni serĉas la sintenon, kiun ordonas al ni en la internacia politiko nia katolikismo... »

Internacia Unuiĝo de la Katolikaj Asocioj por Korpa Eduko. — Internaciaj gimnastikaj konkursoj okazos 16-17 julio 1932 en Nice (Francujo). — Al la Internacia Unuiĝo nun estas aliĝintaj asocioj el Aŭstrujo, Belgujo (2), Ĉeĥoslovakujo (2, 1 ĉeĥa-slovaka, 1 germana), Francujo, Germanujo, Italujo, Luksemburgo, Nederlando (2, 1 por piedpilko, 1 por gimnastiko), Jugoslavujo, Svisujo.

Junulina Sekcio de la Internacia Unuiĝo de la Katolikaj Virinaj Ligoj. La prezidantino, Christine de Hemptinne, sciigis al ni, ke al la junulina sekcio nun apartenas 31 ligoj el 21 landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio kun 3.000.000 junulinoj. Kelkaj grupoj formiĝas en Azio kaj Afriko. Oni laboris speciale per reciproka informado al asocioj, kiel al individuoj, interŝanĝo de dokumentoj, gazetoj, metodoj, per reciproka helpo kaj komuna studo en la komitato, kiu kunvenas ĉiujare, kaj en la kongresoj, kiuj okazas dujare. Bonaj rezultoj estas akiritaj, kaj kelkaj novaj ligoj estas fonditaj en landoj, kie ili antaŭe ne ekzistis. La nunjara kongreso estos en Luzern (Svisujo).

La Katolika Junmetiista Unuiĝo nun trovas grandan intereson ankaŭ en landoj, kie ĝi antaŭe ne ekzistis. Ekz. la lasta numero de la « Mitteilungen » represas interesan artikolon de P. Kennan S. J. el la angla revuo «The Month». Do ankaŭ en Anglujo oni serioze konsideras la enkondukon de la Kolping-Unuiĝo. — La ĉefsekretario Pastro D-ro Nattermann revenis el Sudameriko, kie per lia vizito la unuiĝoj estas instigitaj al nova laborado. Novfondoĵ prepariĝas. — La movado ankaŭ progresas en aliaj landoj, ekz. en Rumanujo en Bucovina.

Internacia katolika junulara agado por malarmado kun internacia konferenco en okcidenteŭropa lando nun estas en preparo. MOKA kunlaboras. Detalojn ni ankoraŭ ne rajtas publikigi.

Internacia Konversacio de gvidantoj de la katolika laborista junularo diverslanda okazis antaŭ nelonge en la sekretariejo de la J. O. C. (Kristana Laborista Junularo) en Bruxelles. Eĉ Kanado estis reprezentita.

Mondjunularo Katolika (MOKA) en la lasta tempo ne entreprenis multajn novajn publikajn agadojn, sed koncentrigis la fortojn al varbado por La Juna Batalanto. Komprenoble la kontaktoj kun multaj asocioj restis kaj estas plifortigitaj. Ni sukcese partoprenis en la Krucmilito de Eŭropa Junularo por Malarmado.

EL LA KATOLIKA PACA MOVADO.

Aŭstrujo. La Paca Ligo de Aŭstraj Katolikoj, kies prezidanto estas D-ro Katann kaj kies sekretario estas Kaspar Mayr, ludas gravan rolon en la Kartelo de ĉiuj pacaj organizaĵoj (Agöf) kaj kunlaboris en tre sukcesa konferenco, kiu ekupidiĝis pri malarmado, speciale pri la « interna » malarmado, t. e. forigo kaj senarmigo de la batalorganizaĵoj de ĉiuj tendencoj. Eksdepuite Prelato Drexel faris bonegan paroladon en tiu konferenco, li ankaŭ partoprenis kiel aŭstra delegito en la Konferenco de Grandaj Organizaĵoj por Malarmado, kiu okazis fine de novembro 1931 en Paris.

Belgujo. Jam okazis kelkaj preparaj kunsidoj por la fondo de Belga Katolika Paca Ligo. Partoprenas gvidantoj de la Junulara Asocio, de la Socialaj Virinaj Unuiĝoj kaj de gravaj aliaj grupoj, krome la direktoroj de la revuoj « La Terre Wallonne », « La Source », « La Cité Chrétienne », « La Parole Universitaire », « L'Esprit Nouveau », « Les Cahiers de la Jeunesse Universitaire Catholique ». Sekretario de la prepara komitato estas Elie Baussard (Charleroi), direktoro de « La Terre Wallonne ». La ĉefsekretario de MOKA ĉeestis laŭ speciala invito unu el la preparaj kunsidoj kaj donis raporton pri la katolikaj pacaj ligoj en aliaj landoj. — En Flandrujo speciale la gazeto « Hooger Leven » (Averbode kaj Antwerpen), eldonata de Pastro Valvokens kaj Gerard Walschap, estas energie pacifista. — A. C. J. B. (Junulara Asocio) akceptis favoran rezolucion por la malarmado.

— « La Terre Wallonne » (Charleroi) kaj « La Source » (Bruxelles) nun servas preskaŭ ekskluzive al la katolika pacifista agado.

Danujo. La gazeto « Universal », eldonata de nia amiko kaj MOKA-sekretario Pastro L. Wolff en dana, germana, pola, franca kaj Esperanta lingvoj, havas la specialan taskon servi la katolikan pacan ideon kaj la internacian fratecon.

Franco. La Ligo de la Francaj Katolikoj por la Paco kaj la Internacia Justeco sendis sian prezidanton, por legi gravan deklaron pri la malarmado en la Kongreso por Malarmado okazinta fine de novembro en Paris. La sekretario de la Ligo interesiĝis pri Esperanto, lernis la lingvon kaj atentigis pri ĝi en la bulteno. — La Katolika Asocio de la Franca Junularo faris tri kuraĝajn paŝojn por la paco, kiuj incitis atakojn, eĉ en certaj katolikaj rondoj : unue ĝi subskribis alvokon de katolikaj francaj organizaĵoj por franca-germana interpaciĝo, due ĝi sendis delegitaron kun ĝia pastra ĉefgvidanto Abbé Lalande S. J. al la Kongreso de la Germana Katolika Junvira Asocio en Trier, kaj trie ĝi subskribis kune kun liberpensaj, socialistaj kaj protestantaj junularaj asocioj alvokon por franca-germana kunlaboro kaj eniris tiucelan komitaton formitan el tiuj asocioj.

Germanujo. Laŭ iniciato de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj inter la germanaj katolikoj okazas serioza kaj intensa varbado por malarmado, al kiu ankaŭ servis la lasta kongreso de la Ligo okazinta en novembro en Berlin sub honorprezido de episkopo Schreiber. La alvokon de la Paca Ligo por Malarmado subskribis 13 germanaj episkopoj kaj multaj eminentuloj.

Nederlando. La Roomsche Katholieke Vredesbond in Nederland energie kunlaboris en la agadoj por malarmado.

Svisujo. Apud la katolika paca grupo « Pro Pace » en Basel nun fondiĝis samnoma grupo en Zürich. La fondokunveno (la 8 aprilo), ĉeestis kiel « internaciulo » nia amiko Kaspar Mayr. Prezidanto estas O. Spahni, eklezia konsilanto Pastro D-ro Teobaldi. Sukcesan evoluon!

Usono. Catholic Association for International Peace eldonis interesan kaj sufiĉe detalan deklaron pri la malarmado. Diversaj grandaj katolikaj organizaĵoj, ekzemple la Katolika Virina Ligo, akceptis ankaŭ bonegajn rezoluciojn tiucelajn. La Asocio havis sian 6-an jarkonferencon en Cleveland (Ohio), la 28-29 marto. La malferman paroladon faris episkopo Schrems. Oni laboris en 7 komitatatoj pri : etiko, paca edukado, Latinameriko, Eŭropo, Azio, ekonomiaj rilatoj, historio. Kompetentaj prezidantoj gvidis tiujn diskutojn. La ĉefa temo de la plenkunsidoj estis komprenoble malarmado, kaj speciale la temo de Pastro Cyprian Emanuel, O. F. M., estis tre interesa : « Ĉu la milito estas nuntempe justigebla? ». Pluaj paroladoj kaj diskutoj okazis pri la religiaj persekutoj en Hispanujo, la problemoj de la manĉuria konflikto, ekonomiaj konfliktoj kaj iliaj solvoj, la situacio en Latinameriko. — La Asocio nun jam posedas 12 fakajn komitatojn.

EL LA ESPERANTO-MOVADO

XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos en Paris, 30 julio - 6 aŭgusto 1932. Adreso : La Maison de France, 101, Avenue des Champs Elysées, Paris VIII., Kotizo : 125 fr. fr. Oni eldonas specialan kongresgazeton.

La nunjara Katolika Kongreso Esperantista okazos kredeble en aŭgusto en Lourdes. Detaloj ankoraŭ ne estas publikigitaj.

Espero Katolika, organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) ŝanĝis siajn redaktoron kaj administranton. La adreso nun estas : Pastro Font-Giralt, Collell (Prov. de Gerona), Hispanujo. La jara abonprezo estas 30 fr. fr.

Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj gajnis tri episkopojn (de Middlesbrough, Leeds kaj Menevia) kiel protektantoj. Gratulon!

Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj intencas okazigi Esperantistan kunvenon internacian okaze de la Eŭkaristia Kongreso, sed bezonas antaŭe scii, kiom da eksterlandaj Esperantistoj partoprenos. Interesiĝantoj anoncu sin tiuj (adreso en nia kongresa kalendaro)!

« *Juna Samidcano* » estas la nomo de nova Esperantista junulara gazeto. Ĝi aperas monate en Krakow (Plac Matejki 4, Polujo) kaj estas nun ankaŭ oficiala organo de TEJA (Tutmonda Esperantista Junulara Asocio). Specialan intereson ĝi montras por la skolta movado.

Socialdemokrata Junulara Asocio de Svedujo rekomendis en sia lasta jar-kongreso Esperanton.

La Universala Kongreso de Esperanto 1933 okazos en Köln, ĝin invitis Germana Esperanto-Asocio kaj la ĉefurbestro de Köln, D-ro Konrad Adenauer.

La Centra Konsilantaro de Internacia Turismo havis sian lastan ĝeneralan kunsidon en aŭgusto 1931 en Budapeŝto kaj esprimis post longa ekzameno la deziron, ke la kono de Esperanto estu disvastigata inter la oficistaro kaj servistaro de hoteloj.

Meteorologio. La Meteorologia Observejo en Taten (Japanujo) jam kvarfoje publikigis grandan sciencan jarraporton en Esperanto. Nun la Instituto de Meteorologio kaj Geodinamiko en Ljubljana (Jugoslavujo) komencis uzi Esperanton en siaj raportoj.

Esperanto en lernejoj. En Lyon (Francujo) la Urba Konsilantaro sub prezido de Edouard Herriot unuanime akceptis rezolucion, proponante Esperanton kiel devigan fakon en la lernejoj de la tuta mondo. — En *Grekujo* la Ministro de Publika Instruado per nova cirkulero rekomendis al la lernejoj inspektoroj, « akceli la Esperanto-instruadon pro la ĉiutage kreskanta graveco de Esperanto en la civilizita mondo ». — En *Nederlando* la Ministro de Publika Instruado dekretis, ke Esperanto, jam ŝtate subvenciita, estu fakultativa lernfako en komercaj lernejoj. — En *Svedujo* la parlamento denove decidis subvencii per 2.900 kronoj la Esperanto-kursojn por instruistoj.

La Princlando Liechtenstein eldonis novajn oficialajn poŝtkartojn kun Esperanto-teksto.

Esperanto plifaciligas internacian vojaĝadon! En Cannes (Francujo) oni faris nun la vojtabulojn dulingvaj : en franca lingvo kaj Esperanto. — En *Den Haag* (Nederlando) la telefon-administrejo starigis telefon-aŭtomatojn, sur kiuj la instrukcioj por uzado estas skribitaj en kelkaj naciaj lingvoj kaj en Esperanto. — En *Dijon* (Francujo) dum la lasta franca Esperanto-Kongreso Gaston Gérard, vicministro por turismo, laŭdis la utilecon de Esperanto por turistoj kaj por la internaciaj rilatoj. — En *Italujo* la Touring-Club Italiano, asocio kun 400.000 membroj, eldonis en Esperanto dikan gvidlibron pri Milano kaj la Lagoj de Lombardio. La sukceso estis tiel kontentiga, ke oni nun preparas similan gvidli-

bron pri Romo. — La unua *Mondkongreso por Aŭtomobilstratoj en Genève* (Svisujo) decidis subteni proponon, ke Esperanto estu utiligata kiel helplingvo por aŭtomobilsignaloj kaj por la plifaciligado de aŭtomobilvojaĝoj. — En *Rio de Janeiro* (Sudameriko) la 3-a sudamerika kongreso por turismo proponis la publikigon de gvidlibroj kaj gvidfolioj en Esperanto. Tiaj gvidlibroj kaj gvidfolioj jam ekzistas por multaj centoj da urboj kaj regionoj.

En Soveta Ukrainujo la ŝtata Libroeldonejo preparas eldonon de krestomatia kunokstrakto el la plej gravaj literaturaj aŭtoroj ukrainaj. La libro aperos en Esperanto.

Esperanto estas uzata en la *Internacia Pacifista Gazetar-Oficejo* (Hago, Nederlando), en la nova gazeto « *Juna Generacio en Eksterlando* », kiu aperas en diversaj lingvoj en Berlino, en la komunista semajna gazeto *AIZ* (« *Arbeiter-Illustrierte* ») aperanta en Berlino.

La grava katolika gazeto « Berichte zur Kultur- und Zeitgeschichte » eldonata en Vieno de Nikolaus Hovorka, enhavas konstantan rubrikon « Esperanto-Servo ».

La komunistaj Esperantistoj anoncas eldonon de Lenin-Verkaro en Esperanto. Ĝi enhavos 16 volumojn kun pli ol 3.000 paĝoj. La unuaj du volumoj (po 400 paĝoj) aperos jam en ĉi tiu jaro. Kiam la katolikoj povos fari ion similan?

Senarmigo! La franca sekcio de la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco eldonis sian efikan glumarkon « Senarmigo » ankaŭ en Esperanto. La markon desegnis la fama franca artisto Paul Colin. Ĝi montras du statojn, la nuna epoko estas reprezentata per homo kun bajoneto, sed... bandaĝita kapo kaj mortanta aspekto, malantaŭe troviĝas — nur konturvizaĝo — alia figuro homa kun olivuja branĉo : la estonto. Aĉetu tiun glumarkon ĉe S-ino Guinaud, Rue Blanchard, Ballancourt (Seine-et-Oise), Francujo, en Germanujo ĉe S-ino Elise Jacobs, Mathildenstr. 9, Flensburg. Unu folio (42 glumarkoj) kostas 4 fr. fr. (0.70 RM).

ESPERANTO EN LA KOLPING-INTERNACIO.

En la Katolika Junmetiista Unuiĝo (Katholischer Gesellenverein) la intereso por Esperanto ĝojige kreskas, kiel ni jam kelkfoje povis konstati. En la gazetoj de la movado kelkfoje oni atentigis pri Esperanto, la jarraportoj de la germana, aŭstra kaj nederlanda asocioj donis statistikon pri la Esperantogrupejoj, la nederlandlingva jarlibro publikigis ĝin, kaj la germanlingva « *Kolpingskalender* » publikigis tripaĝan artikolon pri Esperanto kun atentigo pri MOKA kaj LA JUNA BATALANTO. Jen kelkaj novaĵoj.

Aŭstrujo. La jarraporto por 1931 sciigas, ke ekzistas 4 Kolping-Esperantogrupejoj.

Germanujo. Aldone al nia raporto en J. B. de julio 1931 ni povas sciigi, ke la tiama listo de 9 Kolping-Esperantogrupejoj pligrandigis kaj ke nun ekzistas 10-15 tiaj grupoj. I. a. en Berlino nun laboras vigla grupo sub prezido de Hans Haydt, kiu intencas enkonduki la movadon en ĉiujn Berlinajn Kolping-Unuiĝojn.

Nederlando. Laŭ la jarlibro « *Kolping-Jaarboekje 1932* » ekzistas en Nederlando 7 Kolping-Esperantogrupejoj : Amsterdam IX, Amsterdam XII, Leiden, Lisse, Roelofarendsveen, Rotterdam V, Rotterdam IX.

**NUN ESTAS TEMPO, por ke vi varbu almenaŭ unu novan abcnanton !
Sendante vian abonprezon, aldonu la abonpagon
de via nove varbita amiko! Dankon!**

Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1932.

Kiel ĉiujare, MOKA kunmetis liston de gravaj internaciaj konferencoj, kongresoj, kunvenoj, tendaroj ktp. Oni skribu al la citataj adresoj; ĝeneralaj informoj estas ankaŭ donataj de la internacia oficejo de MOKA, sed oni ĉiam aldonu duoblan afrankon aŭ du internaciajn respondkuponojn. La listo estas daŭrigota kaj kompletigota. Pri kelkaj aranĝoj la definitiva dato ankoraŭ ne estas fiksita. Ni atentigas, ke la citado ne ĉiukaze signifas rezervan rekomendon de la kongreso aŭ de la invitanta organizaĵo.

13-21 majo	Waldhüsung (N. L.). Germ.	3-a Internacia Laborservo en Germanujo. Freideutcher Werkbund, Guben, Heimstättenring 2.
16-22 majo	Freusburg, Germ.	Junulara Semajno (internacia). Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg.
15-25 majo	Budapest, Hungarujo	Int. Kongr. de Pen-Klubo. 107 Great Russel Street, London WC 1.
majo	Den Haag, Nederlando	Int. Konf. de la radikala, liberala kaj demokrata junularo. W. P. Campbell, 55 Hatton Garden, London EC 1.
majo	Grenoble, Franc.	Kongr. de Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco. 12, rue du Vieux-Collège, Genève, Svis.
junio	Zürich, Svis	Int. Socialista Junulara Kongreso. SJI, Berlin SW 61, Belle-Alliance, Platz 3.
20-23 junio	Antwerpen, Belg.	Int. Kongr. de la Kristanaj Sindikatoj. Drift 12, Utrecht, Nederl.
31 majo	Köbenhavn, Dan.	Int. Alianco de Turismo, 44, Rue de la Loi, Bruxelles, Belg.
22-26 junio	Dublin, Irlando	Internacia Eŭkaristia Kongreso. Eucharistic Congress, Dublin.
22-26 junio	Dublin, Irlando	Int. Katolika Esperantista Kunveno, ILKE, 1 Wellington Quay, Dublin C 4.
fine de junio	Bruxelles, Belg.	Katolika int. junulara konferenco pri aktualaj temoj (prec. malarmado). D-ro Solzbacher, Köln-Dellbrück, Bensberger Markweg 63, Germ.
9-14 julio	Eden ĉe Berlin, Germ.	Int. Vegetarana Kongreso. H. E. Feix, Giselgasse 1413, Warnsdorf, Ĉeĥoslov.
19-27 julio	Chelmsford, Essex, Anglujo.	Int. Kristana Skolta Tendaro. YMCA, rue de Montchoisy, 2, Genève, Svis.
16-17 julio	Nice, Franc.	Internacia Katolika Konkurso pri Gimnastiko kaj Muziko. F. G. S. P. F., 5, place St-Thomas d'Aquin Paris, 7.
13-23 julio	Eden ĉe Berlin, Germ.	Int. Somera Universitato por praktika vivrenovigo. Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg, Germ.
julio	Sofia, Bulgar.	Balkana Konferenco de la Internacia Studenta Servo. I S S, 13, rue Calvin, Genève.
julio	Ĉeĥoslovakujo	Kongreso de Internacia Studenta Servo. Sama adreso.
18-21 julio	Genève, Svis.	Int. Kongr. por Infanprotekto, 31, Quai du Mont-Blanc, Genève.
23-29 julio	Los Angeles, Usono	Int. Kongreso pri la Libertempo de Laboristoj. M. Rivers, 315, Fourth Ave, New-York City, Usono.
27 julio	Edinburgh, Skotlando	Kongreso de la Int. Federacio de Universitataj Virinoj. Grosby Hall, Cheyne Walk, London S. W. 3.
-4 aŭg.	London, Angl.	Int. Kongr. de Instruistoj en duagrada Lernejoj. M. A. Beltette, 35, rue du Fief du Bon Recueil, Ville-momble, Sene, Franc.

25 julio	Dana Insulo	Int. Junulara Tendaro de la Internacio de Militkontraŭuloj. Alfred Boll, Flensburg, Postfach 134, Germ.
-3 aŭg.	Flensburg	Int. Kongr. de Tabakkontraŭuloj. R. Bretschneider, Dresden-A 20, Golberoderstr. 17, Germ.
komence de aŭg.	Bergen, Norvegujo	XXIV-a Univ. Kongreso de Esperanto. Maison de France, 101, Av. des Champs-Élysées, Paris VIII., Franc.
30 julio	Paris, Franc.	XVI-a Katolika Esperanto-Kongreso (IKUE). René Cl. Colas, 31, rue de la Gare, Deuil (S. et O.), Franc.
-6 aŭgusto	Lourdes, Franc.	Tutmonda Proleta Esperanto-Kongreso (IPE). J. Batta, Berlin C 25, Postfach N° 2.
aŭgusto	Berlin, Germ.	Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso (SAT). W. Neumann, Vogelsangstr. 66, Stuttgart.
30 julio	Stuttgart, Germ.	XI-a Tendaro de Skolta Esperantista Ligo (SEL), N. Booth, Netherton, Huddersfield.
-4 aŭgusto	Stuttgart, Germ.	Tutmonda Konferenco por Nova Edukado. Dr Elisabeth Rotten, Dresden-Hellerau, Schulplatz 8, Germ.
6-11 aŭgusto	Stuttgart, Germ.	VIII-a Internacia Universitata Kongreso por Katolikaj Misioj. Abbé Rossel, Fribourg, Svis.
aŭgusto	ĉe London, Anglujo	Kongreso de PAX ROMANA. Pax Romana, Fribourg, Svis.
29 julio	Nice, Franc.	Katolikaj Universitataj Semajnoj (internaciaj). Salzburg, Franziskanergasse 2.
-12 aŭgusto	Fribourg, Svisujo	Internacia Amikeca Tendaro. Int. Friendship League, Mr. A. T. Cummings, 51, Colbourne Ave., Moulscotbe, Brighton, Anglujo.
31 julio	Fribourg, Svisujo	Int. Instruista Kongreso. 2, rue de Montpensier, Paris.
-3 aŭgusto	Bordeaux-Lourdes, Franc.	Internacia Konferenco de Skoltinoj, 17, Buckingham Palace Road, London SW 1.
8-14 aŭgusto	Salzburg, Aŭstr.	Kongreso de Int. Studenta Konfederacio. CIE, 22, Place de Brouckère, Bruxelles, Belg.
9-23 aŭgusto	Salzburg, Aŭstr.	Kongreso de Interparlamentana Unuiĝo. 5, place Claparède, Genève.
aŭgusto	Peacehaven, Angl.	Int. Studenta Tendaro. YMCA, Rue de Montchoisy 2, Genève, Svis.
aŭgusto	Luxembourg, Luksemburgo	Internacia Junulara Tendaro. YMCA, Rue de Montchoisy, 2, Genève, Svis.
6 aŭgusto	Polujo,	Junulara Tendaro. Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg.
5-15 aŭgusto	Riga, Latvujo	Junulara Semajno. H. Eichbauer, Hamm/Sieg.
somero	Genève, Svis.	Internacia Katolika Virina Kongreso. Temo: Encikliko pri la Eduko. U. I. L. C. F., Mariaplaats 33 b, Utrecht, Nederlando.
5-13 aŭgusto	Domino, Ile d'Oléron, Franc.	Int. Demokrata Porpaca Kongreso (Marc Sangnier), 34 Bd. Raspail, Paris VII., Franc.
13-20 aŭg.	Mszana Dolna, Pol.	Int. Studenta Konf. kontraŭ la Alkoholismo. Krupnicza 29, Krakow, Pol.
21-28 aŭg.	Müden (Lüneburger Heide), Ger.	Kongr. de Int. Fed. de Ĵurnalistoj, 2, rue de Montpensier, Paris, Franc.
28 aŭgusto	Freusburg, Germ.	Junulara Semajno Internacia. Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg.
3 sept.	Luzern, Svis.	Int. Kongr. por Bestprotekto kaj kontraŭ Vivisekcio. 34, rue de Lille, Paris VII.
septembro	Luzern, Svis.	Mondkonferenco por Internacia Amikeco per la Eklezioj. 41, Parliament St., London SW 1.
septembro	Hispanujo,	
septembro	Warszawa, Pol.	
aŭtuno	London, Angl.	
2-9 oktobro	Freusburg, Germ.	
oktobro	Berlin, Germ.	
novembro	Washington, Usono	

Nia Movado.

Internacia Oficejo.

La internacia sekretario finis sian kvarmonatan vojaĝadon kaj jam reprenis sian kutiman laboron. Do li povas denove korespondi, sed bonvolu pardoni neeviteblajn prokrastojn!

Eldonejo La Juna Batalanto.

Du novaj varbiloj, ambaŭ sur bonega papero kaj en plaĉa aspekto, nun estas je via dispono. La kvarpaĝa folio « Mondjunularo Katolika » donas en Esperanto ĉiujn informojn pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM), la nova broŝuro de nia ĉefsekretario « Die Katholische Weltjugendliga » (12 paĝa) estas nun la plej taŭga germanlingva propagandbroŝuro de MOKA (0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM). MOKA-anoj, utiligu tiun materialon!

La nova abonjaro komenciĝas per ĉi tiu numero, kaj niaj abonantoj konsiderinde plifaciligas nian laboron, se ili tuj pagas kaj ne atendas admonilon. Dankon!

Aŭstrujo.

La nacia sekretario Walter Mudrak partoprenis la Krucmiliton de Eŭropa Junularo por Malarmado ĝis Genève. Tie li efike propagandis, speciale por Esperanto. En la finemonstracio en Genève li estis unu el la parolantoj, alportante en sia parolado la specialajn salutojn de MOKA kaj atentigante pri la neceseco de la helplingvo Esperanto. Unu frazon li elparolis en Esperanto. Amiko Mudrak ankaŭ estis en la oficiala delegitaro, kiu estis akceptata de S-ro Henderson, prezidanto de la Malarmada Konferenco.

Landeck (Tirolo). Revojaĝante de Genève nia MOKA-sekretario Walter Mudrak parolis en kunveno organizita de nia agema samideano Hilkersberger en la katolika unuiĝo pri la Krucmilito por Malarmado. Ĉe estis pastro Falkner, kaplano, kun siaj fervoraj Esperanto-gelernantoj, kiu konsente esprimis sian opinion pri la raporto, ĉiutage i. a., ke li kiel partopreninto de la granda Mondmilito « ne plu partoprenos militon ». Li daŭrigis, ke nur katolika internacio povas garantii veran pacon, kaj montris laŭ propraj travivaĵoj la neceson de la internacia helplingvo Esperanto por praktika efektiveco de tiu celo.

Innsbruck. « Arbeiter » (« Laboristo »), organo de kristansindikataj laboristoj, raportis la 13 aprilo pri la kunveno en Landeck, la 20 aprilo la sama gazeto presigis la artikolon « La sanga internacio de la militindustrio » el LA JUNA BATALANTO, tradukita de Hilkersberger.

Salzburg. Katolika Mondjunularo, atentu! Oni invitas vin al Salzburg! Katolika Esperanto-laboro estas ankaŭ laboro por la misioj, por Ligo de Nacioj en Kristo, laborado por Lia Paca Regno! Tial, katolika Esperanto-junularo, ankaŭ vi montru vian forton ĉe la granda demonstracio de la Krucmilito de Studenta Junularo por la Misioj (Missionskreuzzug der studierenden Jugend) en belega urbo ĉe la rando de la Alpoj, en la Germana Romo — en Salzburg (Aŭstrujo).

Venu, precipe vi, katolika studentaro, al Salzburg, ni atendas vin! Ne timu la penadojn de la vojaĝo, ĉar ĝi estos des pli bela, kiam ni povos premi reciproke la fratajn manojn vizaĝe al la potencaj montglaciaĵoj, kiel ni de ĉiam spirite donis la manojn unu al la alia en nia mendunuiganta Esperanta pacideo!

Ni atendas vin, katolika studenta Esperanto-junularo, speciale el Germanujo, Aŭstrujo kaj el eksterlanda germanaro, kaj ni alvokas vin: Ĝis ĝoja revido en Salzburg!

Katolika Esperanto-Grupo « Estonteco », Salzburg.

Prenu plumon kaj notu:

Tempo: de 2 aŭgusto vespere ĝis 6 aŭgusto matene, 1932.

Loko: Salzburg, « germana Romo ».

Ĉefloĝejo: La ĉefepiskopa seminaria gimnazio Borromäum kaj tendaro, kiu estos transmetata post la kunveno en la montaron (belega libertempado).

Organizanto: Aŭstra grupo de « Studentenmissionskreuzzug » kun ĝenerala sekretario Msgr. Drexler, Wien I., Stefansplatz 3/III.

Pli detalan programon, prezojn ktp. sciigos nur je demando de la unuopaj interesuloj la sekretario de « Estonteco », Leopold Bauer,

Borromäum, SALZBURG-Parsch, Aŭstrujo.

Kristo devas reĝi!

Dio volas ĝin!

Wien. Nia nacia sekr. Mudrak paroladis la 21 aprilo pri la Krucmilito por Malarmado kaj la vizito ĉe Henderson.

La 28 februaro okazis ĝeneralkunveno de Katolika Unuiĝo Esperantista. En la diservo Pastro Kudrnovsky predikis en Esperanto. Prezidanto S-ro Chiba salutis multnombrian ĉeestantaron (150 personojn), li prezentis jarraporton, direktoro Schiebl kasraporton. La estraro estas reelektita: prezidanto S-ro Chiba, unua vicprezidanto Pastro Kudrnovsky, dua vicprezidanto Walter Mudrak. Pastro Prioro W. Nedwid O. S. B. fariĝis denove estrarano kiel pastra konsilanto. Samideano Hovorka nome de Laborkomitato de Vienaj Esperantistoj atentigis pri okazontaj Ĉe-kursoj. Post la oficiala parto sekvis kantoj en Esperanto de F-ino Wernert, akompanitaj de S-ro Chiba per korno, kaj simbola ludo « Kunlaboro » originale verkita en versoj de W. Mudrak. Aktoris F-inoj Kolar (Paco), Lippert (Esperanto), Scherpon (Vivrenovigo) kaj Fida (Junularo). La ludo prezentas « kunlaboron » por la paco, nova vere kristana socia ordo kaj sobreco (Vivrenovigo), en kiu Esperanto servu kiel ilo kaj kiu efektiveco per la junularo. Ni intencas publikigi la teatraĵeton en J. B.

Nun okazas bonege vizitataj Ĉe-metodaj Esperanto-kursoj gvidataj de Ĉesinjoroj Morariu, partoprenas ĝojiga nombro da katolikoj. Speciala kurso okazas en la Katolika Junmetiista Domo. La 10 aprilo okazis solena Esperanto-diservo kun Esperanto-prediko de Pastro Cseh (Ĉe), kiu ankaŭ faris paroladon en la Paca Ligo de Aŭstraj Katolikoj kaj en la Leo-Societo. Lin ankaŭ akceptis simpatie, mallonge antaŭ sia morto, Kardinalo Piffl.

Pentekoste okazos Esperantista Kunveno okaze de la ĉeĥa « Orel » Jubileo. MOKA sendos reprezentanton. Krome ĉeestos nia samideano Macek el Bratislava kun 60 gestudentoj, inter kiuj multaj skoltoj kaj 20 Esperantistoj.

Francujo.

Paris. Nia nacia sekretario Prof. Pierre J. A. Muffang faris paroladon pri la internaciaj rilatoj, pri MOKA kaj Esperanto antaŭ la katolikaj lernantoj de la « Conférence Olivaint », la 25 februaro.

Germanujo.

Miltenberg. Pastro Prefekto Kiessner gvidas Esperanto-kurson por 32 fervoraj junuloj.

Wewelsburg. Nia grupo preparas regionan konvenon de MOKA en formo de Esperanta kaj Paca Kunveno.

Litovujo.

Telšiai. En pastra seminario prepariĝas fondo de Esperanto-grupo en kunlaboro kun MOKA.

Svisujo.

La internacia sekretario de MOKA paroladis pri malarmado en amasaj kunvenoj en Basel (1200 ĉeestantoj), La Chaux-de-Fonds (400), Le Locle (300), Tavannes (400), Neuveville (250), Lausanne (900).

« Die Schildwache », katolika gazeto en Basel, enhavis artikolon kontraŭ Esperanto, nia redaktoro sendis respondon.

Osten. Grava katolika ĵurnalo « Der Morgen » (« La Mateno ») publikigis la 29 aprilo longan artikolon pri « La Historio de Mondĵurnalo Katolika » (ĉ. 220 linioj) verkita de nia fervora MOKA-Delegito W. Guldemann.

Zug. « Jungmannschaft » (« Junviraro »), la bonega semajna organo de la Svisa Katolika Junvira Asocio, eldonis la 28 aprilo specialan numeron pri la paca ideo. Ĝi enhavis i. a. longan artikolon de la internacia sekretario de MOKA.

NOVAJ ESPERANTO-LIBROJ

Ĉiujn librojn oni povas mendi ĉe la Eldonejo La Juna Batalanto, Bonvolu aldoni 10 % por sendkostoj!

Fratino Teresa. Du horojn en timo. 32 pĝ., Eindhoven 1931, Centra Nederlanda Katolika Esperanto-Librejo. Prezo: f. 0.50, RM 0.85.

Facila legolibro por katolikaj infanoj. La piednotoj en nederlanda lingvo estas utilaj al nederlandanoj kaj ne ĝenas tiun, kiu ilin ne bezonas. Papero kaj aranĝo estas bonaj, eĉ luksaj, kaj laŭ lingva kaj religia vidpunkto ni povas same rekomendi la libreton, kiel tion faris nia samideano Heilker en la antaŭparolo. Cetere ankaŭ multaj « grandaj infanoj » ĝojos pri la rakonto...

Sten Bergman. Tra sovaĝa Kamĉatko. El sveda lingvo trad. Birger Gerdman. 276 pĝ. kun multaj bildoj kaj geografiaj kartoj. Stockholm 1932. Eldona Societo Esperanto. Broŝ. sved. kr. 4,50 (RM 4.—), tolbind. kr. 6.— (RM 5,50).

La duoninsulo Kamĉatko norde de Japanujo estas mistera lando de vulkanoj kaj montoj, kaj de strangaj gentoj primitivaj. Bergman kun sia juna edzino estis du vintrojn en la lando kaj verkis tiel interesan libron pri siaj spertoj, ke oni tuj tradukis ĝin en 12 lingvojn. Eldona Societo Esperanto en Stockholm faris Esperanto-eldonon, kiu estas ĵunulo malpli granda kaj malpli multekosta, sed ne malpli valora, de la Andrée-libro, kiun ni povis recenzi lastjare. Luksa aranĝo, belaj bildoj, bonega lingvaĵo, malalta prezo, speciale nun, kiam la sveda valuto estas falinta. Ni atendas mendojn de niaj belegantoj.

Fabeloj de Andersen. Plena Kolckto, Trad. D-ro L. L. Zamenhof, Tria Parto. 160 pĝ., Paris 1932. Esperantista Centra Librejo. 9 fr. fr., 1.40 RM.

Nun denove ĉiuj tri partoj de la Fabeloj de Andersen en la majstra traduko de Zamenhof estas haveblaj. La tria parto enhavas kelkajn el la plej belaj rakontoj, ekz. la belegan « Historion de Patrino ». Ĉiu, kiu estos leginta la Fabelojn, ne komprenos, ke ekzistas homoj, kiuj opinias, ke ili nur estas interesaj por infanoj. En silentaj horoj legu fabelojn!

Rampo Edogaŭa. Ora Masko. El japana lingvo trad. Joŝiŝi Simomura. Volumo I. 112 pĝ., ilustrita, Tokio 1931, Japana Esperanto-Asocio. Tolbind. 3.— RM.

Kun grandega zorgemo oni preparis preson kaj aranĝon de ĉi tiu lukse vestita libro. Ni bedaŭras, ke oni ne elektis pli bonan objekton. « Ora Masko » estas kriminalromano laŭ eŭropaj ekzemploj iomete adaptita al japana ĉirkaŭaĵo. Observi tian adaptiĝon, estas eble interese por literaturistoj. Literaturan kaj moralan valoren la verko ne havas.

La Internacia Labora Organizaĵo: konstitucio, agado, rezultatoj. 10 pĝ., Bureau International du Travail, Genève, senpage.

Nun tiu mallonga informilo pri la Internacia Labor-Oficejo ekzistas ankaŭ en Esperanto, eldonita de I. L. O. mem. Ĉiu, kiu interesiĝas pri internacia sociala agado, mendu senpagan ekzempleron!

Hans Jungschaffer. Wie denken Sie über Esperanto? 24 pĝ., havebla ĉe la aŭtoro. Ried i. L., Bahnhofstr. 22, Aŭstrujo. 0.30 S (0.20 RM). 5 ekz. kun afranko 1.70 S. 1.— RM.

Leŭte verkita kaj plaĉe prezentita varbilo germanlingva. Kontraŭulo de Esperanto kaj Esperantisto dialogas. Propagandistoj disvendu aŭ disdonacu la broŝuron!

Anoncetoj.

Anoncetoj, speciale pri korespondado, kostas 0.50 RM, ĝis 20 vortoj.

Junuloj kaj junulinoj. ne malpli ol 20-jaraj, kiuj volas servi per ĉiuj fortoj la pacidealon, trovi en tio panon kaj laboron kaj kunlabori je la konstruado de nova, pli bela estonteco, skribu, aldonante mallongan vivpriskribon, al la Friedensheim Belén, Hoppstädten a. d. Nahe, Germanujo. Al demandoj bonvolu aldoni respondafrankon!

Germana samideano deziras korespondadi kaj ŝanĝi poŝtmarkojn kun francaj kaj hispanaj amikoj. Skribu al Joh. Pollinger, stud., Marklhofen, Niederbayern.

MOKA-grupo Wewelsburg. Paderborn-Land (Fr. Lüttig), Germanujo, deziras korespondadon kun francaj Esperantistoj por 28 jara fotografisto, 21 jara lignajisto kaj 20 jaraj masonisto kaj tajloro. La fotografisto, iama studento, deziras korespondadon kun teologistudento.

Hinduĵo. Kvar knaboj, 14-16 jaraj, en katolika lernejo de la hinda ŝtato Travancore, deziras Esperanto-korespondadon kun samaĝaj katolikaj knaboj, precipe en Germanujo. P. J. Mathew, V. M. Philip, C. A. Abraham, K. C. Vankey, Adreso: High School, Pulincunoo, Travancore, Hinduĵo.

Irlanda MOKA-ano. William Brady, 22 Townsend St., BELFAST, Irlando, 24 jara, deziras korespondadon kun geamikoj el Hispanujo.

En Köln eksterlanda katolika ĵunulo aŭ junulino trovas je favoraj kondiĉoj pensionon, evt. kun lecionoj en germana lingvo aŭ alia moderna lingvo. Skribu al G. Cohen, Köln-Lindenthal, Wiltgensteinstr. 18-1.

Haus Lindenhof, Jugenheim bei Darmstadt, Germanujo, ŝatata aĉkuracloko, dieto, frukto, kaj fruktsukokuracoj, gvidado tra centrarejnaj urboj kaj centragermanaj regionoj, instruado pri germana lingvo al eksterlandanoj, granda biblioteko en la domo, naĝbanejo apud la domo, arbaroj kaj montoj, teatroj, muzeoj en proksima Darmstadt (ĉiuhora aŭtobuso).

KATOLIKA VIVO

KATOLIKA VIVO mortis. Ĝi fariĝis viktimo de la ekonomia krizo kaj ankaŭ viktimo de la indiferenteco aŭ eĉ malamikeco de multaj katolikaj Esperantistoj. Estas tre bedaŭrinde, ke multaj ne komprenas la nepran bezonon de serioza agado, por utiligi Esperanton en la servo de la katolika agado. Multaj katolikaj Esperantistoj nur volas sporte amuziĝi per la internacia lingvo. Kaj kelkaj eĉ pensas, ke ili devas ataki kaj malhelpi la agadon de seriozuloj. Ni mem tion ofte spertis, feliĉe nia movado estas sufiĉe forta, por ne fali.

Nia kunlaboro kun **KATOLIKA VIVO** estis harmonia kaj amika. Des pli ni bedaŭras, ke ni ne plu povas akcepti mendojn por la « kombinita abono » je K. V + J. B. La malapero de **KATOLIKA VIVO**, kiu iel anstataŭis la antaŭan **KATOLIKAN MONDON**, estas granda perdo por nia movado. Ni esperu, ke, se la tempoj iom pliboniĝos, simila gazeto povos fondiĝi.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO.

20 Führer der Jugend aus 17 Ländern

schufen auf Anregung des Schweizerischen Katholischen Jungmannschafts-Verbandes das umfassende Sammelwerk

JUVENTUS CATHOLICA

Die katholischen Jugendverbände Europas.

Das Buch enthält auch eine ausführliche Darstellung der Katholischen Weltjugendliga, mehrere Freunde der MOKA und des JUNA BATALANTO haben mitgearbeitet. Das Vorwort schrieb der Bischof von Basel.

Jeder Freund der internationalen katholischen Jugendarbeit muss dieses einzigartige Programm- und Nachschlagebuch besitzen!

Vorzügliche Ausstattung, Umfang 212 Seiten, **Preis 2,40 RM.**
Bestellt beim Verlag La Juna Batalanto!

DIE KATHOLISCHE WELTJUGENDLIGA

von Dr. Wilhelm Solzbacher,

Soeben erschien diese kleine, aber wirksame Aufklärungsschrift auf sehr gutem Papier und in vorzüglicher Aufmachung. Jeder Leser des JUNA BATALANTO muss sie besitzen und verbreiten.
12 Seiten

Preis 15 Pfg, 5 Stück 50 Pfg.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger
Marktweg 63.

AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŬUROJN!

Mondjunularo Katolika, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

La Jeunesse Mondiale Catholique, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo, 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0.70 RM).

Die katholische Jugend lernt Esperanto. Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo), 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

Katholiken, lernt Esperanto! La sama varbilo kun alia titolo. Sama prezo.

Die Katholische Weltjugendliga. Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa, 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

Die Katholische Weltjugendliga. 16 paĝa broŝuro aperinta 1929. Plej bona informilo pri la historio de nia movado, 0.30 RM.

Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung. Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlath, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado, 0.30 RM.

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger
Marktweg 63.